nia voĉo

madrida esperanto-liceo decembro 2019

## ZAMENHOF-TAGO EN MADRIDO

Por celebri la 160-an datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof, la sabaton 14an de decembro kunvenos la esperantistoj de Madrido kaj ĉirkaûaĵoj. La evento, organizita de Madrida Esperanto-Liceo, okazos en la kulturejo Centro Sociocultural Mariano Muñoz, ankaŭ konata kiel Asociación Vecinal La Cornisa (http://cornisa.org). Ĝi troviĝas en la kvartalo Pradolongo-Usera, strato Cristo de Lepanto, metrostacio Almendrales. Ankaŭ proksimas la trajna haltejo Doce de Octubre (Cercanías).

Ni disponos la lokon ekde la 11a matene ĝis la 6a vespere. La programo enhavos kelkajn prelegojn, prezentaĵojn, ludojn, ktp. Se vi havas ion interesan por rakonti al ni, certe eblos enprogramigi vin; kontaktu kun la prezidanto de MEL ĉe la adreso: <manolo (punkto) parra (ĉe) yahoo (punkto) es>. Ni disponigos rimedojn por projekcii.

Eblos tagmanĝi en la kafejo de la Centro; la tag-menuo kostas 10 € kaj konsistos el lentoj (vegetara) kaj bovida fileo, alternative omleto, sen plia elekteblo. Ĝi inkluzivas dezerton kaj kafon/infuzaĵon. Por partopreni la komunan tagmanĝon en la kultura centro Mariano Muñoz estas necese anonciĝi unu semajnon antaûe, elektante ĉu viandon ĉu omleton. Do se vi intencas kunmanĝi, skribu al la adreso jam menciita supre. Tempolimo por rezervi: sabato 7a je la 24a horo. Poste ne eblos aliĝi al la komuna tagmanĝo. Tamen, ekzistas en la ĉirkaŭaĵo diversaj manĝejoj.

Baldaŭ ni informos pli precize pri la programo, per la komunaj rimedoj, sed, memoru, ne hezitu proponi vin mem, kiel eble plej baldaŭ, per ajna el viaj lertoj kaj emoj.

## ESTIS PREZENTITA "ROMPU, ROMPU!" EN MATADERO

Kiel anoncite, la 29an de novembro, je la 7a vespere, estis prezentita en la kulturcentro Matadero la teatraĵo titolita "Rompu, rompu (la murojn inter la popoloj)!" [tiel, en Esperanto]. Ĝi enhavis ne nur titolon en Esperanto, sed ankaŭ en tiu lingvo estis elparolitaj la vortoj de la tria akto, fakte, la plejmulto de la paroloj aŭskultitaj dum la tuta verko, kiu pleje disvolviĝis per muziko, registraĵoj, dancoj kaj projekciaĵoj. La aktorino kiu elparolis la esperantajn vortojn tion faris preskaŭ perfekte, tre kompreneble, des pli laŭdinde ĉar temis pri sufiĉe longa parkerita teksto.



La 28an okazis provludo, kiun ĉeestis esperantistoj kunlaborintaj en la disvolvo de la teatraĵo. La prezenton de la 29a ĉeestis plia aro da esperantistoj, kiuj havis la okazon mallonge gratuli la verkiston, Blanca Gracia.

## LITERATURA RENKONTO "PALABRAS, SONIDOS Y VIBRACIONES"




La Najbarara Biblioteko de la kvartalo San Fermín de Madrido, kiu ĉijare festas sian 25an datrevenon, organizis la 21an de novembro Literaturan Renkonton, kun titolo "Palabras, Sonidos y Vibraciones" ("Vortoj, sonoj kaj vibradoj"), en la gastejo San Fermín, kie jam antaŭe okazis esperantistaj aranĝoj. Al ĝi estis invititaj tri elstaraj poetoj: Antonio Crespo Massieu, la poeto de tiu kvartalo Ana Belén Martín kaj nia esperantista poeto Miguel Fernández.

Kunlaboris ankaŭ kantpoetino, Julia, kaj ludistino de metalaj bovloj. Najbaroj deklamis poemojn ktp. Entute, ĉirkaŭ du horoj. Miguel dediĉis sian kanton al Ĉilio, Bolivio kaj, ĝenerale, al Latin-Ameriko, voĉlegis la tekston en la hispana kaj kantis akompanata de kamarado el sia plektr-orkestro, Gabi Pulido. La publiko tre ŝatis, forte aplaŭdis. La poetinoj María Ángeles Maeso kaj Belén García Nieto, kiuj ĉeestis kiel spektantoj, varme gratulis Miguel-on. Entute tre agrabla kaj sukcesa vespero.

## KONGRESOJ KAJ RENKONTOJ

Post la kutima festado de la Zamenhofa Tago en la tuta mondo ĉirkaŭ la 15a de decembro, tiu ĉi monato estas tradicia momento por kelkaj festaj kaj familiaj neformalaj renkontoj en Esperantujo ĉirkaŭ la fino de la jaro. Ekzemple, JES – Junulara E-Semajno – estas jarŝanĝa renkontiĝo, ĉiujare dum unu plena semajno. Ĉi-jare ĝi okazas jam la 11-an fojon, en Pollando, en la vilaĝo Karłów (ĉeĥe Karlov, germane Karlsberg), apud Kudovo (Kudowa-Zdrój/Chudoba), el 27-a de decembro ĝis 3-a de januaro. Pliaj detaloj: http://jes.pej.pl/eo/.

La 18-a "Novjara Renkontiĝo" (NR) okazos en la samaj datoj en Wiesbaden, Germanio, kun titolo "Komune festi la Novan Jaron", kaj speciala aranĝo por junuloj kaj junaj plenkreskuloj: Novjara Internacia Semajno, NIS. Detaloj: http://www.esperantoland.org/nr/.

Aparte, ni povas anonci ke ĉe la fino de la unua aliĝperiodo, jam pli ol 80 homoj aliĝis al la 79-a Hispana Kongreso de Esperanto, okazonta en Comillas de la 30a de aprilo ĝis 4a de majo 2020. Jam aperis la unua versio de la programo, kaj vi povas vidi pliajn detalojn, inklude de la aliĝmaniero kaj loĝado, ĉe la adreso: http://www.esperanto.es/kongreso.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

Kutimaj ĉiusemajnaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30, kiel tradicie. ATENTU: Pro la planoj por la Zamenhofa Tago, kaj pro la festoponto komence de decembro, la unuasabata renkontiĝo NE okazos en tiu ĉi monato.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com